

LA

VERDA

STELO



**ESPERANTO  
NEDERLAND**

**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE  
&  
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

aprilo 2009



## LA VERDA STELO

eldono de

### ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

#### ESPERANTO-KLUBO GRONINGEN-DRENTE

##### prezidanto

s-ro J.B. Swenker  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
tel. +3150 527 45 72  
retadreso:

prezidanto.groningen@esperanto.hobby.nl

##### sekretariejo

s-ino N. Kiel-Klunder  
G. Sterringastraat 6o  
9728 VV Groningen  
tel. +31505251436  
retadreso: secretaris@esperanto.hobby.nl

##### kasisto

s-ro L. Staghouwer  
Julianalaan 25  
9781 ED Bedum  
tel. +3150 301 40 15  
retadreso: luitstaghouwer@home.nl

#### FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman  
Westerein 14 a  
8571 GB Harich (Frl)  
tel. +3151 460 22 72  
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

##### ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

##### kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1  
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas  
de la 19h45 ĝis la 21h45

##### Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC Groningen  
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

##### redakcio

J.B. Swenker, H. Roeters, N.R.Kiel-Klunder  
retpoŝto:redaktoro@esperanto.hobby.nl:



## Enhavo

- 3 Klubkunvenoj, naskiĝtagoj
- 4 Kasisto sciigas
- 5 Pri la nordo
- 11 Jarraporto
- 12 Redakto ŝanĝo de La Verda Stelo
- 12 Honora membreco
- 13 Esperantokurso de Teleac
- 13 Esperantokurso en la nederlanda lingvo je interreto.
- 14 Hundo kaj koko
- 15 Gaasterlando, ekskurso la 30-an de majo

#### Contributie Esperanto Noord-Nederland 2009

<b>Afdelingslid</b> (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
<b>Gezinslid</b>	€ 6,25
<b>Donateur</b> (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op Postbanknr. <b>3822472</b> t.n.v. <b>ESPERANTO NOORD-NEDERLAND</b> te Bedum	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **ESPERANTO NEDERLAND.**

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:  
78 68 44 167 (TRIODOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg  
587, 1704 BH Heerhugowaard.

<b>Lidmaatschap</b> (incl. abonnement Fen-X)	€ 27,50
<b>Gezinslid</b>	€ 8,00


# Klubkunvenoj

## majo

- 5 liberiĝa festivalo en Stadpark Groningen  
11.30 horo ĝis 18.00 horo
- 7 gastpreleganto
- 21 **ne okazos!** (Ĉielirtago)

30 al *Gaasterlando* (Frislando) – okazos **sabaton!!**  
Vidu p. 15

### Someraj renkontiĝoj ekde la deka matene

- 25 **junio** Schimmelpenninckhuys 
- 20 **aŭgusto** En la domo de Nelly Kiel  
G. Sterringastraat 6o Groningen

## Aŭgusto

12 posttagmeze, kultura festivalo en la urba centro de Groningen  
La kultura festivalo estas parto de la KEI-semajno dum kiu la novaj studentoj spertas ion pri kulturo en Groningen.

## septembro

- 3 ferioj
- 17 ludoj
- oktobro**
- 1 malferma vespero
- 15 ŝatokupoj
- 29 gasto

## novembro

- 12 enigmo
- 26 ?

## decembro

- 10 festvespero

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj ŝanĝojn vi trovos en nia retejo sub la rubriko

**Aktuale**

<http://pingveno.nl/klubo>

## majo

- 5 Gonda Kruyer
- 11 J. Hennekam-Tijs, J. van der Laan
- 23 Frans Schild
- 25 A. Hoekstra
- 27 W. Renken

## julio

- 9 D. Langers



## junio

- 1 A.M. Oosterwijk-Dominicus
- 8 H. van Dalen
- 16 Harm Roeters
- 24 W. Rijnders, J. Snoek

## aŭgusto

- 10 Nelly Kiel-Klunder
- 16 Koos Scharroo
- 30 Johan Swenker

# Naskiĝtagoj

## Kotizo

Sur paĝo 2 de nia informilo troviĝas i.a. sciigo pri la kotizoj de nia klubo. Pluraj membroj kaj abonantoj intertempe jam transkontigis la ŝulditan sumon por la jaro 2009. Koran dankon!

Al tiuj kiuj ne jam pagis la kotizon mi urĝe petas plenumi tiun devon kiel eble plej baldaŭ.

Membro pagu € 12,50, samhejmano €6,25. Do la sumo por membro kaj samhejmano kune estas € 18,75.

Abonanto pagu € 7,00 kaj donacanto minimume €7,00.

Kompreneble ankaŭ membroj kaj abonantoj rajtas pagi pli ol la menciita minimuma sumo.

La ŝulditan sumon oni transkontigos al konto 38 22 472 de Esperanto Noord-Nederland en Bedum.


Anticipe dankas vin la kasisto.

## Contributie

Het is plezierig dat meerdere leden en abonnees hun contributie voor het kalenderjaar 2009 inmiddels hebben betaald. Wanneer deze financiële verplichting tot op heden aan uw aandacht is ontsnapt, dan wordt u verzocht het verschuldigde bedrag binnenkort over te maken op rekeningnummer 38 22 472 t.n.v. Esperanto Noord-Nederland te Bedum.

De verschuldigde bedragen staan vermeld op bladzijde 2 van de "informilo". Het minimaal te betalen bedrag voor twee leden op hetzelfde adres is dus €18,75 ( € 12,50 + € 6,25).

De penningmeester noteert graag binnenkort ook uw betaling.



Bij het overzicht van de verschuldigde contributie staat ook het rekeningnummer van Esperanto Nederland vermeld.

**Sinds kort heeft Esperanto Nederland een nieuw rekeningnummer: 78 68 44 167 (TRIADOS-Bank), t.n.v. Esperanto Nederland, Middenweg 587, 1704 BH Heerhugowaard.**

## Pri la nordo

**27 novembro 2008**

Kiam ni alvenis, ni vidis sur la tablo stokon da malnovaj Esperanto-libroj, kiuj apartenis al sinjoro Ubel Smit. Ni rajtis kunpreni la librojn.

La temo de la klubkunveno estis librocenzoj. Sed kiel ĝenerale ni komencis paroli pri kio okazis en Esperantujo dum la antaŭaj semajnoj.

Wil sciigis ke NEJ havas novan estraron, kiu intencas reaktivigi la grupon.

Ineke atentigis nin pri la manko de estraranoj en Esperanto Nederland.


Envenis tiam sinjorino Walentyna, polino el Bjalistoko, konatino de Ineke. Ŝi rakontis iom pri la venonta UK kaj pri la preparoj por ĝi. Ŝi jam informpetis por ni pri eblecoj gastloĝi en Bjalistoko mem kaj en la ĉirkaŭaĵo de Bjalistoko.



Ŝi pretas reveni en majo por prelego.

Wil kaj Johan preparis sin por la temo de la vespero.

Johan rakontis pri la libro "La biblio, ĉu historio, ĉu legendo", de André Cherpillod, kaj pri la nederlanda libro de Vincent Icke:



(Tute ne relativa)

En tiu libro estas tekstoj kun kaj sen formuloj, ambaŭ pri la sama temo. (1x tekstoj, 1x formuloj).

La libro temas pri la relativeca teorio de Einstein.

La libro plaĉas al Johan, kiu mem preferas la tekston kun formuloj.

Wil preparolis la libron "Forkaptita" de Stephenson, origine anglan libron, tradukita en Esperanton en 1976 de Albert Goodheir.

Wil petis nin respondi demandojn pri la enhavo laŭ demandolisto, kiun ni antaŭe ricevis.

Estis amuza vespero.

**8 januaro 2009**

La ĉeftemo de ĉi tiu vespero estas "Vivanta gazeto".

Unue Wil laŭtlegas ricevitan retmesaĝon pri la nova UEA-ekzameno, kiu estas konforme al la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro. Dum la Internacia Festivalo en Dusseldorf ok partoprenantoj (el

ses landoj) estis la unuaj kiuj trapasis ĉi tiun internacie rekonatan ekzamenon.

Jaap, la filo de Wil, adaptis la interretkurson por ke ĝi estu interaktiva. La adaptita kurso baldaŭ disponeblos en interreto.

Pluraj membroj partoprenis la retan voĉdonadon favore al la enkonduko de Esperanto en lernejoj en Usono. La voĉdonado celas prezenti al la nova usona prezidento kelkajn temojn kiuj havas vastnombran apogon.

Dum iom da tempo ni preparolis la spamproblemojn en interreto.

Luit kunportis plurajn gazetartikolojn. Kelkaj artikoloj temas pri gravaj temoj: La milito en la Gaza-regiono kaj la problemoj en pluraj landoj de sud-orienta Eŭropo pro la rusa decido ne plu liveri gason al Ukrainio.

Aliaj artikoloj temas:

- Pri Friso kiu sur malmmodernaj sketiloj (kaj biciklo) sukcesis veturi la konatan Sketitineron preter la dek unu frisaj urboj. Li rikoltis ne nur admiron, sed ankaŭ kritikon, "duŝiĝon vestitan" kaj monpunon.
- Pri sesjara usona knabo kiu maltrafis la lernejan aŭtobuson kaj pro tio klopodis veturi al la lernejo per la gepatra aŭto. Post dek ses kilometroj la ŝirmrelo baris pluan veturadon. La junulo ne grave vundiĝis.
- Pri 83 kunikloj kiuj vivis sur subtegmentejo de ordinara unufamilia domo en Almere.
- Pri la malkonstruo de la artefarita sketejo antaŭ la malnova

urbodomo en Groningen. Pro la malalta temperaturo oni devis uzi hejtigilojn por fandi la glacieron.

- Pri la deziro de moslimaj oficistoj ĵuri je Alaho anstataŭ je Dio.

Wil kunportis plej freŝdatan ekzempleron de Dagblad van het Noorden kaj ni parolis pri la venonta translokiĝo de grava parto de la firmao Getronics de Assen al Groningen.

En la gazeto estis ankaŭ artikolo pri nacia lotumado en kiu kelkaj (por ni nekonataj) personoj gajnis multe da mono.

Alia artikolo temis pri la ornamaĵo sur multaj turoj: la preĝeja virkoko. La funkcio de tiu virkoko estas montri el kiu direkto blovas la vento. Pro tio oni parolas ankaŭ pri "ventvirkoko" kaj "vetervirkoko".

Sed la preĝeja virkoko havas ankaŭ religian signifon. En fruaj kristanaj artaĵoj jam videblas virkoko. Plej ofte tiu virkoko estas referenco al la biblia historio en kiu Petruso malkonfesis Jesuon jam antaŭ la unua kokeriko.



## 22 januaro 2009

La 22-an de januaro ĉeestis nur kvin anoj.

Unue ni iom parolis pri interreto k.t.p. Luit voĉlegis la protokolon pri la kunveno de la 8-a de januaro. Wil voĉlegis la leteron, kiun ŝi mem sendis al la klubanoj por danki ilin pro la fakto ke ili kun aliaj realigis ke ŝia naskiĝdatreveno ĉi-jare iĝis por ŝi neforgesebla tago.

Johan enmanigis Wil la libron de Andre Cherpillod "La biblio, ĉu historio? ĉu legendo?", kiu dum la festo ankoraŭ ne estis veninta el Roterdamo. En koverto estis krome ankoraŭ kelkaj monbiletoj por ŝia vojaĝo al Berlino.

Ni parolis pri la alvokoj voĉdoni favore al Esperanto en Usono kaj rilate al la eŭropa komunumo.

Dum la venonta studsemajnfino ĉeestos grupeto de "Loesje" por fari kun kelkaj kursanoj sloganojn favore al Esperanto.

Unu el la novaj kursanoj de Wil metis la voĉon de Zamenhof, kiu estis aŭdebla ĝis nun nur malklare sur sonbendo, multe pli klara sur KD-on. Ni tiel povis aŭskulti la komencan parton de "Antaŭparolo" de "La Unua Libro". Zamenhof voĉlegis tiun tekston iam por kanadaj esperantistoj.

Post tio ni venis al la temo de la kunveno, nome la filmo kun la titolo "Vizito al la Centro Oficejo". Ni vidis sur ĝi multajn al ni konatajn personojn inter kiuj Koos, Frans kaj Wil. La filmo apartenas al la klubo kaj tiuj anoj kiuj ŝatas vidi ĝin hejme, povos ĝin pruntepreni.

Restis ankoraŭ iom da tempo, kiun ni uzis por diskuto pri Esperanto-unuiĝoj, revuoj, k.t.p.

Sekvantfoje Johan prelegos pri Ubuntu. Luit legis en artikolo de Bram Vermeule,

ke la vorto ubuntu fakte signifas: Mi estas, ĉar aliaj estas.

## 5 februaro 2009

Johan malfermis la kunvenon. Wil van Ganswijk havis kelkajn interesajn rimarkojn, i.a. pri menciado de ŝia novstila retkurso en Gezinsbode.

Poste sekvis diskuto pri la (ne)uzado de majuskloj ĉe la vorto Esperanto.



Johan Swenker prelegis pri Ubuntu, kio estas senpaga komputera programo.

Ubuntu estas afrika vorto, ĝi estas koncepto. Desmond Tutu uzis la vorton en prelego. Tiu ĉi koncepto estas ankaŭ vivstilo de aŭskulti, dialogo kaj komunikado unu la alian. Je respektplena maniero.

Ĝeneralaj informoj pri Ubuntu troviĝas en la retejo:

<http://www.ubuntu-nl.org/ubuntu>

Pli da informoj pri la prelego de Johan vi povas legi je la retejo:

<http://www.xs4all.nl/~ardezo>

Lia prezento troviĝas je la retejo

[www.xs4all.nl/~ardezo/Esp-ubuntu.odp](http://www.xs4all.nl/~ardezo/Esp-ubuntu.odp)

Pli facile legi tion ol mia klopodo surpaperigi lian prelegon.

Ĝustatempe Johan fermis la kunvenon!

## 19 februaro 2009

Nia jarkunveno.

Kiel ĉiam ĝi estas ankaŭ normala klubkunveno. Tio signifas ke ni multe babilis. Tial ni bezonis 2 horojn por pritrakti la aferojn de la klubo.

Wil ekzemple sciigis nin ke Gerrit Berveling estos en la televido la 5-an de marto en la programo Eigenheimers.

En Groningen ni ne povas ricevi tion. Sed en interreto, je "Uitzending gemist?" de rtvoost, vi ankoraŭ povas vidi la elsendon: <http://www.rtvooost.nl/tv/?uid=101454>



La plej aĝajn membrojn de nia klubo ni salutis per bildkarto de Esperanto monumentoj en Nederlando. Ni do kune skribis kaj transdonis karton de unu al la alia: "ne, tiun mi jam subskribis". Estis ĥaosa afero. Poste ni rimarkis malgrandan erareton, kiun Wil solvis.

Ineke ricevis peton de Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse. Ili iros al festivalo pri popolmuziko kaj Esperanto en Barcelono.

Por tiu festivalo ili bezonas Esperantajn tekstojn laŭ melodio de balfolkaj dancoj. Dum la klubvespero ni interkonsentis pri kunveno je Ineke.

*Marita kaj Marian irus ankaŭ al IJF en Italujo. Sed pro la tertremo la IJF estas nuligita. Oni bezonas la kunvenejon kiel*

*tranoktejon por la senhejmuloj.*

Jam dum jaroj la estraro klopodas ke iu alia fariĝas estrarano. Pasintjare konatino de Wil fariĝis membrino. Ŝi eĉ fariĝis aktiva membro. Iel Wil sukcesis persvadi ŝin ke ŝi fariĝu sekretarino. Do per laŭta aplaŭdo ni bonvenigis Nelly Kiel kiel nian novan sekretarinon.

Alia grava ero de la jarkunveno estas, ke ni akceptis Wil van Ganswijk kiel honoran membron. Fakte tio jam okazis dum la naskiĝtaga festo de Wil, sed ni oficialigis tion dum la jarkunveno.

Wil estas grava ne nur por nia klubo, sed ankaŭ por ILEI kaj NGGE. Jam antaŭe ILEI kaj NGGE honoris ŝin per honora membreco.

Aliaj menciindaj aferoj estas:

- la kotizo en 2010 estos la sama kiel ĝi estis en 2009, do 12,50 eŭroj por membro.
- Wil anoncis sin por la kaskontrolkomisiono, ŝi ja bezonas novan taskon ĉar ŝi ne plu estas sekretarino. Dua persono ankoraŭ ne estas trovita.

## 5 marto 2009

La kvinan de marto la temo de la kunveno estis la rakontisto Andersen.

Sed antaŭe ni parolis pri la muzikgrupo Kapriol'! Kapriol'! konsistas el Ad Bos, Rutger Dijkstra, Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse. Kune ili prezentos "balfolk" dum junularaj kunvenoj en Italio kaj Hispanio. La programlibro de tiuj



kunvenoj havas enkondukan tekston pri Kapriol! kiun ni korektis.

Dume ni manĝis bongustan kukon kiun Luit kunportis. Li regalas nin pro lia naskiĝdatreveno.



Wil ĉiun marton ricevas martenicon de bulgaraj amikoj. Martenico estas ne nur pupeto el ruĝa kaj blanka fadenoj, sed pli grave ĝi estas ankaŭ simbolo de bondeziro. La ricevanto portas ĝin sur la vestaĵo ĝis la komenco de la printempo. Kaj la printempo komenciĝas kiam vi ekvidas la printempon ekzemple kiel hirundon aŭ elburĝonitan arbon.

H.C. Andersen estis ne nur verkisto de fabeloj. Li estis ankaŭ tondaĵartisto.



Andersen do desegnis per tondilo anstataŭ per kraĵono. Unu tiajn tondaĵojn Luit iam ricevis de dana korespondamiko. Li kompreneble kunportis kaj montris ĝin.

En 1985 Wil prelegvojaĝis tra Danlando. En la Andersen muzeo ŝi vidis la originajn tondaĵojn de Andersen. Dum la prelegvojaĝo ŝi tranoktis ĉe esperantistoj. Unu el ili iam donacis la libron "H.C. Andersen Liaj vivo kaj verkoj" al Wil. Wil voĉlegis parton de la libro:



... , preskaŭ kortuŝe infana; ĉar tiu ĉi granda infano neniam povis esti malica. Post sia konfirmacio la juna H. C. Andersen senvualigis al sia patrino sian planon vojaĝi al Kopenhago. Responde al la demando de la patrino, kion li volas en la ĉefurbo, li simple diris: "Mi volas esti fama. Oni unue suferas terure multe, kaj tiam oni famiĝos."

<http://www.brunajokuloj.dk/3afsnit.htm>

Poste Nelly eksplikis ke multaj rakontoj de Andersen estas aŭtobiografiaj.

## 19 marto 2009

La ĉeftemo de ĉi tiu vespero estis: Serĉu la erarojn. Ĉar Johan ne ĉeestis Wil ludas la rolon de prezidanto.



Wiebren ricevis peton por prelego en mezlernejo en Leeuwarden. Wiebren

trovis preta fari tiun prelegon Dirk Rietdijk el Leeuwarden. Wiebren montris serion de 24 komputilaj tekstobildoj, kiuj povos servi kiel bazo por prezenti Esperanton al la publiko. Wiebren petis la opinion de la ĉeestantoj kaj prilaboros la komentojn poste.

## 2 aprilo 2009

La 2-an de aprilo nia klubkunveno estis tutalia ol kutime. La tabloj estis forŝovitaj kaj la seĝoj staris kontraŭ la muroj. Sur unu el la tabloj troviĝis tasoj kaj subtasoj, kafo, teo kaj tortetoj, per kiuj Tinie Bulk regalis nin pro sia 90-jara naskiĝdatreveno.

Ĉeestis 25 personoj, esperantistoj kaj neesperantistoj. La kvar plej gravaj personoj ĉi-vespere estis Marian, Marita, Ad kaj Rutger.

Marian kaj Marita vi eble rememoras. Kune kun Nanne kaj Ankie ili prezentis sin antaŭe kiel Kajto. La nomo de ilia nova kvaropo estas Kapriol'. Ili muzikas, instruas kaj gvidas dancojn. Ĉi-monate ili prezentos sin dum IJF en Italio kaj dum alia festivalo en Hispanio.



Ilia programaro ekzistas el balfolko. Ili volonte volis elprovi sian prezentadon ie en Esperantujo.

Tio do okazis dum nia klubvespero, anstataŭ la anoncitaj ludoj.

Estis tre agraba, gaja vespero dum kiu ni havis eblecon multe moviĝi kaj dum kiu ni krome montris al la neesperantistoj, la uzeblecon de Esperanto.



Se mi bone memoras estis la nomoj de la dancoj kiujn ni lernis: Ĵigo, Andro, Vidanco, Skotdanco, Bureo kaj Mazurko. La teksto de la lasta danco estis:

*Plezuris sciuro, melo kaj urso,  
Ili dancis kune meze en arbar',  
Kaj kun ili dancis mi.*

Ni kantis tiun tekston, kiel kanonon. Ĉu vi iam dancis kanonon? Ni ĉi-tiun vesperon faris tion. Estis tre amuze! Jam estis la deka kiam ni finis la dancadon. Johan dankis la ĉeestantojn kaj speciale la anojn de la nova muzik/dancgrupo, kiuj prizorgis la programon.

## Raporto de la sekretario pri la jaro 2008

Nia klubo havas 52 membrojn, do kresko de ses, plus dek abonantojn kaj unu donacanton.

### Kunvenoj

Ni planis 17 kunvenojn, el kiuj unu ne okazis.

En la somerperiodo ni dufoje renkontis unu la aliajn dum kafotrinkado en restoracioj. Entute 14 anoj uzis tiun eblecon. La renkontiĝoj okazis sur la tegmentteraso de V kaj D kaj en la ĝardeno de "Schimmelpenninckhuys".

### Gastprelegantojn

Du gastprelegantojn nin invitis, Rob Moerbeek kaj Ginta Uittenboogaard. Rob parolis pri Novaj eldonoj de Esperanto-libroj, Ginto pri Litovio.

### Temoj

La temoj de la ceteraj kunvenoj estis tre variaj: Harm Roeters, kiu sukcesis en la internacia Esperanto-ekzameno dum la UK, prelegis pri Trompo kaj propra profito. Wil rakontis ion pri lkonoj. Ni rigardis kune la filmon Gerda malaperis. Aliaj temoj ĉi-jare estis: Vivanta gazeto, poemoj, jarkunveno, proverboj, demandludo, ekzamenekzercoj, librorecenzoj, ferioj kaj festvespero.

Antaŭ la somerferioj ni manĝis kune kiel kutime en la picejo 'Il Lago' kaj meze de decembro ni ripetis la festvesperon kun bufedo. La vespero estis denove sukcesplena.

La Malfermita Vespero estis vizitata de du novaj interesiĝantoj.

Dek du anoj de nia sekcio partoprenis en la UK en Roterdamo. Ineke Emmelkamp eĉ estis la sekretario de la LKK.

Unu grupano dufoje kaj alia unufoje partoprenis studsemajnfinojn, kie Wil instruis ambaŭfoje la komencantojn. Koos ĉeestis instrutagojn en Herzberg kaj kelkaj el ni vizitis la Malferman Tagon de UEA en Roterdamo.

### Estrarkunvenoj

La estraranoj interkonsiliĝis per interreto, cetere ili kontaktis inter si telefone.

### Vizitantoj

La meta nombro da vizitantoj de niaj kunvenoj estis 8.

Ĉeestis fojon eksterlanda gasto, konatino de Ineke, s-ino Walentyna Fiszer Dolinska el Bjalistoko en Polando.

### Kursanoj

Koos per <http://pingveno.nl> kaj Wil per <http://www.esperanto-cursus.tk> daŭrigis instruadon de Esperanto per interreto. Komence de la jaro Wil gvidis hejme novan studgrupeton en kiu estis 3 partoprenantoj el kiuj Nelly partoprenis la UK-on. Post la somerferioj venis kvar novaj gelernantoj.

En 2008 20 scivolemuloj sendis al Wil la tradukojn de la unua leciono, el kiuj 8 daŭrigis la studadon kaj 4 nur iomete. Partoprenas la diskutliston por la kursanoj 220 personoj.

### Revuoj

Nia klubo havas abonon je Monato kaj Horizontaal. Cetere ni ricevas la klubgazetojn de diversaj aliaj Esperantogrupoj kaj sekcioj. La sekretario regule preparas revuojn kun proksimume 6 legaĵoj kaj ili cirkulas inter la anoj. Estas

preparitaj ekde la komenco jam cent dudek kvin da tiaj ujoj.

## Redakto ŝanĝo de La Verda Stelo

Jam dum kvin jaroj Koos Scharroo preparis nian informilon "La Verda Stelo". Li kaj ni ofte ricevis komplimentojn por la aspekto kaj la enhavo. Bedaŭrinde li decidis ke li ĉesu sian redaktoran kaj kompostan laborojn. Koran dankon al Koos por liaj laboroj al La Verda Stelo la pasintajn jarojn.

Koos transdonis la ŝablonon de La Verda Stelo, kaj tiam li aldone rimarkis: se io ne estas tute klara, simple demandu. Do espereble la aspekto restas pli-malpli same bona ol antaŭe.

Feliĉe Nelly Kiel ŝatas eltrovi aferojn. Ŝi akceptis la taskon, almenaŭ por la unua fojo, prepari novan informilon. Do ekde ĉi tiu eldono ni havas novan redaktoran kaj novan kompostiston. Do bonvolu sendi viajn kontribuojn al [redakto@esperanto.hobby.nl](mailto:redakto@esperanto.hobby.nl) aŭ rekte al Nelly Kiel [nrkielklunder@hotmail.com](mailto:nrkielklunder@hotmail.com).

## Honora membreco

La 10-an de januaro **Wil van Ganswijk** festis sian 80-an naskiĝdatrevenon.



Ŝi invitis diversajn grupojn da homoj kiuj iel estas gravaj al ŝi. Inter ili estas sufiĉe granda grupo da esperantistoj. Kutime tian feston ne validas artikoleton en La Verda Stelo. Sed ĉi tiu naskiĝtaga festo estis speciala. Wil estas nia sekretario dum pli ol 10 jaroj kaj faris ankaŭ multajn aliajn aferojn por la klubo. Ŝi estas tutkora organizantino, kiel ni ekzemple notas dum Zamenhofaj tagoj.

Por tiuj kaŭzoj la estraro decidis honori Wil per honora membreco de nia klubo.



Vi pravas, Wil estas estrarano, sed ŝi sciis pri nenio. Ĉiu alia konsentis. La ateston kiu akompanas la honoran membrecon ni donis al Wil dum la naskiĝtaga festo.

La naskiĝtaga festo estis speciala ankaŭ pro la aktiveco kiun Wil organizis. Ŝi regalis sin mem kaj ankaŭ nin per muzika prezentado de Nanne Kalma kaj Ankie van der Meer.



Nanne kaj Ankie kantis en la Nederlanda kaj la Frisa lingvoj, sed kompreneble ankaŭ en Esperanto. Tiel ĉiuj gastoj de Wil povis aŭdi kiel bele sonas Esperanton.

## Esperantokurso de Teleac

La nova estraro de NEJ estas ege entuziasma kaj aktiva. Kiel multaj esperantistoj ili sciis ke en 1972 Teleac elsendis Esperanto-kurson.



Ili ne nur serĉis la librojn kaj diskojn de la kurso, sed ankaŭ petis permeson al Teleac kaj van Kooten kaj de Bie por meti la instruilojn je interreto. Do nun la instruiloj estas elŝuteblaj el la retpaĝoj de NEJ: <http://www.esperanto-jongeren.nl/index.php?m=16>

## Esperantokurso en la nederlanda lingvo je interreto.

De Wil van Ganswijk ni ricevis jenajn sciigojn pri ŝia intereta kurso.

En 1998 mi metis sur interreton la unuan lecionon de tiu kurso. Ke ĝi estas bona kurso, mi sciis, ĉar iam mi trastudis ĝin mem, kiam en Groningen la lecionoj ĉiun semajnon estis presitaj kiel kurso en la gazeto "De Gezinsbode". Oni povis sekvi tiun kurson senpage.

Tial ankaŭ mi neniam petis monon al miaj interretkursanoj por la korektado de la lecionoj. Kelkfoje mi faris superrigardon pri la kurso. Nun mi faras tion lastfoje. Kial nun lastfoje superrigardo pri la nombro da partoprenantoj kaj la rezultoj de la kursanoj?

Jaap, mia filo faris la kurson antaŭ nelonge interaktiva, do la komputilo kapablas ekde tiam mem korekti la tradukitajn frazojn. Mi nun ne plu ricevas tradukojn por korekti. Tio donas al mi malpli da laboro, sed mi ankaŭ ne plu scios, kiuj sekvas la kurson.

Kiaj estis la rezultoj dum la pasintaj dek jaroj?

470 personoj reagis per la sendado de tradukoj. 88 el ili sukcesis atingi la finon de la kurso. Ne pli ol la tradukojn de leciono unu sendis 112 personoj. Inter la lecionoj du kaj dek haltis 219 personoj la sendadon. Inter la lecionoj 11 kaj 20 estis 53 kursanoj kiuj haltis.

Kelkaj ekskursanoj daŭrigis post la interretkurso la studadon per la studlibro "Esperanto leerboek" de Zondervan kaj Manders. Mi ofertis senpage korekti la tradukojn, kiuj staras en tiu libro.

Per la ricevado kaj korektado de tradukoj ekestis diversaj agrablaj kontaktoj inter kursanoj kaj mi. Mi renkontis kursanojn en studsemajnfinoj, je jarkunveno de Esperanto Nederland, malfermaj tagoj de UEA aŭ kelkfoje hejme ĉe ili aŭ ĉe mi. Estas agrable konstati ke estas ekskursanoj kiuj aktivas nun en la Esperanto-movado.

La interaktiva kurso estas trovebla je [www.esperanto-cursus.tk](http://www.esperanto-cursus.tk)

La sama kurso, prilaborita de Koos Scharroo, estas trovebla je

[www.pingveno.nl/cursus/index.html](http://www.pingveno.nl/cursus/index.html)

Antaŭ kelkaj jaroj Maarten van Gompel tradukis la kurson al la angla lingvo. La angla versio de la kurso estas trovebla je [www.unilang.org/course.php?res=64](http://www.unilang.org/course.php?res=64)

La diskutlisto por kursanoj, ekskursanoj kaj interesiĝantoj havas proksimume 120 partoprenantojn.

## Hundo kaj koko

Afrika fablo

Estis hundo kaj koko, kiuj konatiĝis. Iun tagon la hundo diris al la koko: "Ni iru viziti mian fratino." La sekvan tagon ili ekiris. Survoje la koko petis pardonon pro bezono fari ie flanke necesajon.



Tie, sub arbusto li trovis kadavron. Li manĝis ĝin kaj satiĝis. La hundo daŭrigis la vojon kaj alvenis al sia fratino. Tre ĝoja la fratino preparis por la gasto ion por manĝi. Dum ŝi kuiris, la hundo diris: "Metu la viandon sub la rizon, por ke mia amiko koko, kiu venos post mi kaj kiu ne manĝas rizon sen viando, malakceptu la inviton."

La satega koko baldaŭ alvenis kaj helpis prepari la tablon. Kiam ĝi estis preta, la koko diris: "Ĉio estas en ordo por mia amiko hundo. Bonvolu manĝi sen mi." Tiam la hundo ridetis kaj formanĝis la tutan manĝaĵon.

Irante hejmen la hundo fanfaronis al la koko: "Sciu, ke sub la rizo estis viando."



La malkontenta koko sia-vice reciprokis jene: "Kiam mi iris flanken por min malpezigi, mi trovis grandan kadavron, per kiu mi plenŝtopis min. Tial mi ne manĝis la malbongustaĵon de via fratino."

Aŭdinte tion la hundo koleriĝis. De tiu tempo la hundo estas ĵaluza kontraŭ la koko. Ili disiĝis. La hundo komencis la serĉadon, sed ĝis hodiaŭ ne trovis kadavron. Kaj la koko ĝis hodiaŭ skrapas la teron por trovi sub ĝi viandon.

Jen pro tio hundo paŝadas malrekte kaj koko skrapas teron.

Esperantigis: B.Mudole-Guerschon, Zimbabvo

## Gaasterlando

La 30-an de majo ni vizitos Gaasterlandon. Ankaŭ samhejmanoj estas kore invititaj.

Ni renkontiĝos inter la deka kaj deka kaj duono en la domo de Wiebren Akkerman.

Wiebren loĝas en Harich, Friesland: Westerein 14a, poŝtkodo 8571GB.

Li regalos nin per kafo kaj teo.

Post la kafo ni veturos tra Gaasterlando, ni inter alie vizitos la urbeton Sloten.

Posttagmeze ni manĝos kradrostaĵon. La kunveno finiĝos proksimume je la sesa vespere.

Ĉu vi volas partopreni? Sendu retmesaĝon al la sekretario: Nelly Kiel, [secretaris@esperanto.hobby.nl](mailto:secretaris@esperanto.hobby.nl)

Vi povas aliĝi ĝis la 20-a de majo.



ESPERANTO NOORD-NEDERLAND  
T.W.S. Mansholtstraat 25  
9728 MC GRONINGEN



**ESPERANTO – taal zonder grenzen**